

## *Internacia Esperanto-Konferenco – 2011* de la 18-a ĝis la 23-a de aprilo en Wuhan, Ĉinio Temo: la Ĉina Saĝo

**Konstanta adreso:** Eric Laubacher, kasisto de OSIEK, 1 rue Louis–Antoine de Bougainville, F-78180 Montigny-le-Bretonneux.

tel: +33 1 30 96 67 91      retadreso: kasisto@osiek.org

**Loka adreso:** Hubei-a Esperanta Asocio (HEA), 45 Hao, Zi yang Dong Lu.Wuchang,Wuhan CN-430070

tel: +86 -27-63194093    fakso: +86-27- 87324011 - retadreso: trigo1958@163.com

### *Loko*

Wuhan estas grava urbo en centra Ĉinio, kun 5000-jara historio. Ĝi situas je la kruciĝo de Jangzi-rivero kaj Pekin-Kanton-a fervojo. Jangzi-rivero kaj ĝia plej granda branĉo kunigas en la urbo, kaj Pekin-kantona fervojo estas la plej grava trafika linio kiu per rapidaj trajnoj ebligas vojaĝi en nur kelkaj horoj ĝis la plej gravaj urboj kiel Ŝanhajo, Pekino kaj Kantono.

Estas multaj lagoj en -kaj ĉe- la urbo: el ili La Orienta Lago estas la plej granda enurba lago en Ĉinio.

Wuhan entenas kelkajn grandajn muzeojn kun mirindaj kulturaj kaj historiaj heredaĵoj.

2011 estos jubilea celebra jaro pri la Revolucio de 1911 kiu finis, ekde tiu urbo, feudisman sistemon en Ĉinio.

Dum aprilo la vetero estas tre agrabla en Wuhan.



### *Kiel atingi la urbon Wuhan*

**Aviadile:** de Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono simile ĉirkaŭ duhora flugo.

**Perveturile:** ŝoseoj ligas la urbon Wuhan kun supre-menciitaj urboj, tamen aŭte aŭ buse veturi ne estas konsilinde pro la pli-ol-mil-km-a distanco.

**Fervoje:** rapidaj trajnoj funkcias inter Wuhan kaj supre-menciitaj urboj, inter 3 kaj 9 horoj da veturo. Noktaj trajnoj ankaŭ estas tre taŭgaj.

### *Konferencejo*

La konferenco okazos en la provinca Soci-sciencia Centro (urbocentre, kun projekciilo).

### *Loĝado*

- Jingyuan: hotelo en la konstruaĵo kie konferenco okazas, ekde 30 € por ĉambro kun du litoj, kun necesejo kaj duŝo en la ĉambro (kun matenmanĝo)
- Enshi: samkomforta hotelo ĉe la konferencejo, ekde 28 € por ĉambro kun du litoj (kun matenmanĝo) –100 m de la konferencejo
- En ĉi tiu lasta eblas pagi nur 20 € por persono en simila ĉambro kun unu lito.

- ❑ trans la strato de la konferencejo ,10 € por tre malgranda ĉambro kun unu lito (kun necesejeto, sen matenmanĝo)
- ❑ Ekzistas aliaj pli luksaj hoteloj, sed pli foraj de la konferencejo. Eblas mendi ĉambrojn por vi, se vi bezonas.

Noto: ne ekzistas tendumo aŭ mallongtempa loĝej-luado.

### ***Manĝoj***

La konferencejo enhavas restoracion, kiu proponas bongustajn pladojn.

Tagmanĝo: je 5 €, ankaŭ taŭga por vegetaranoj. Kompreneble ĉiam eblas manĝi libere laŭ la menu-karto de la restoracio.

Ĉirkaŭ la konferencejo ekzistas multaj eblecoj por manĝi je tre favoraj prezoj.

### ***Dumkonferenca programo***

**Matene:** tema programo, statuta programo, libroservo, kursoj por komencantoj.

**Posttagmeze kaj vespere:**

- ❑ Interkona vespero.
- ❑ Urbovizitado. Wuhan havas sufiĉe da vindindaĵoj (muzeoj, La Orienta Lago, Jang Zi rivero...) por plenumi plurajn posttagmezojn.
- ❑ Vespere, konigajn programojn de ĉinaj tradiciaj kulturoj (kaligrafio, te-ceremonio, dancoj...).
- ❑ Kaj multaj aliaj surprizoj...



### ***Antaŭkonferenca turisma programo***

Por faciligi kaj riĉigi vian vojaĝon al Ĉinio, ni proponas antaŭkonferencan aranĝon en Pekino, kaj komunan veturadon al Wuhan per trajno el la okcidenta stacidomo. Trajnaj biletoj estos aĉetitaj surloke. Eblas partopreni nur parton de la programo. Manĝoj ne estas inkluzivitaj, sed eblas je tre favora prezo. Prezoj estas proksimaj kaj povos vari.

- la 15<sup>an</sup> de aprilo: vizito de La Ĉinia Murego (30 €).
- la 16<sup>an</sup> de aprilo: vizito de La Antikva Palaco kaj de tradiciaj stratetoj en la urbo, vespermanĝo en pekin-stila loĝejo kun lokaj esperantistoj (30 €).
- La 17<sup>an</sup> kaj 18<sup>an</sup> de aprilo: frumatena trajna vojaĝo de Pekino al An Yang, vizito de la nova muzeo pri ĉinaj lingvoj, tranokto en hotelo ; la dua tago vizito de la ruinejo de Shang-dinastio (antaŭ 4000 jaroj), trajnvojaĝo de An Yang al Wuhan (100 €, inkluzive trajnojn, hotelon, muzeojn).

Por loĝado en Pekino, ni rekomendas al vi mendi rekte ĉe « Railway Hotel China » apud la okcidenta stacidomo, pro frua eliro al An Yang (je la 6<sup>a</sup> matene). Estas facile mendi per interreto (ekzemple : <http://www.booking.com/hotel/cn/bei-jing-rui-er-wei-lian-suo-fan-dian-bei-jing-xi-zhan-dian.html>), je prezoj ĉirkaŭ 30€. Bonvolu noti ke interretaj mendoj funkcias ekde 1-2 monatoj antaŭ la mendita dato.

### ***Foriro el Wuhan***

Ni rekomendas reiri aviadile al Pekino (ĉirkaŭ 100/130 € por unu persono), au per rekta taga aŭ nokta trajno (ĉirkaŭ 20 €/40 €, depende de komforteco kaj rapideco). Ni povas helpi vin aĉeti bileton surloke je favora prezo.



***Internacia Esperanto-Konferenco – 2011***  
**de la 18-a ĝis la 23-a de aprilo en Wuhan, Ĉinio**  
**Temo: la Ĉina Saĝo**

**Aliĝilo** (v2010-10-12)

Tondu, kompletigu kaj sendu tiun ĉi parton al Eric Laubacher, kasisto de OSIEK, 1 rue Louis-Antoine de Bougainville, F-78180 Montigny-le-Bretonneux.

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj.

S-ro S-ino (*Familia nomo*).....

(*persona nomo*).....

(*kompleta adreso*) .....

.....

(*retadreso*) .....

Mi mendas loĝadon por la noktoj: (17) 18 19 20 21 22 (23) en:

- Hotelo Jinyuan (en la konferencejo), en dulita ĉambro
- Hotelo Enshi (fronte al la konferencejo), en  unulita  dulita ĉambro
- Malmultekosta hotelo, en unulita ĉambro

- Mi petas oficialan invitleteron al la konferenco.
- Mi petas aldonajn informojn por atingi la konferencejon.
- Mi petas informojn pri ebleco vojaĝi karavane de Parizo.
- Mi petas informojn pri ebleco vojaĝi karavane de Prago.

**Antaŭkonferenca aranĝo:**

- Mi mendas mem loĝadon en Pekino  mi petas helpon por loĝado en Pekino
- Mi mendas ekskurson al La Ĉinia Murego, la 15<sup>an</sup> de aprilo [30 €]
- Mi mendas ekskurson al La Antikva Palaco, la 16<sup>an</sup> de aprilo [30 €]
- Mi mendas ekskurson en An Yang, per trajno survoje de Pekino al Wuhan, inkluzive trajnbileto kaj tranokton en An Yang, la 17<sup>an</sup> kaj 18<sup>an</sup> de aprilo [100 €].

## Aliĝkoto (en €)

La Jara Koto (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝtmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj, la aliĝkoto al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoro.

Periodo	< 2010-12-31			< 2011-01-31			Poste		
OSIEK-ano	Min 20€	Norm 6*JK	Maks 60€	Min 25€	Norm 7,5*JK	Maks 75€	Min 35€	Norm 10*JK	Maks 100€
Nemembro	80€			100€			120€		
Partatempa partopreno: po 24 € tage									

Rabato 50 %-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handikapuloj.

Rabato 30 %-a por samadresa kunulo de la aliĝinto.

La koto inkluzivas: organizajn elspezojn, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, vizitojn en la urbo, interkonan vespermanĝon. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝojn. La koto estas nerepagebla.

## Solidareca fonduso

Estas bedaŭrinde, ke ekonomiaj cirkonstancoj tre malhelpas kelkajn samideanojn partopreni kaj kontribui en niaj konferencoj. Per via pago al "Solidareca Fonduso" ni povas malaltigi konferencajn kaj loĝejajn kotojn al nivelo akceptebla por ili.

## Bilanco

Mi pagas por konferenca koto: .....€  
por loĝado: .....€  
por solidareca fonduso: .....€  
Entute: .....€  
Mi pagas samtempe kun tiu ĉi aliĝilo: .....€  
Restas al mi por pagi antaŭ la 1<sup>a</sup> de februaro 2011: .....€

## Kiel pagi (eventualaj bankkotoj estos eltiritaj)

Poŝtkonto de la kasisto Eric Laubacher: n° 1 399 87 R PARIS

IBAN: FR47 2004 1000 01013998 7R02 028 BIC: PSSTFRPPAR

UEA-konto de OSIEK: osie-h

FEL-konto de OSIEK: osie-h

Dato..... Subskribo.....